**La protokolo de la reta komitatkunsido de ILEI,**

**2022.12.10**

**Ĉeestis:** 32 komitatanoj rete + 1 voĉo aldone (de Kristin TYTGAT). Entute 33. Kvorumo estis 16.

Partoprenis rete:

**Sekciaj komitatanoj**: Araksia ELBAKJAN (Armenio), Marc CUFFEZ (Belgio), Mariana EVLOGIEVA (Bulgario), Gilbert NDIHOKUBWAYO (Burundo), YU Jianchao kaj GONG Xiaofeng (Ĉinio), Ileana SCHRØDER (Danio), Didier JANOT kaj Emmanuel DESBRIÈRES (Francio), Zsófia KÓRÓDY Germanio), Jozefo NÉMETH (Hungario), Hamzeh SHAFIEE (Irano), Luigia OBERRAUCH kaj Ermanno TARRACCHINI (Italio), ISHIKAWA Tieko kaj UENO Yuriko (Japanio), LEE Junkee (Koreio), Marija BELOŠEVIČ (Kroatio-KEU), Rob MOERBEEK (Nederlando), Magdalena TATARA (Pollando), Mihai TRIFOI (Rumanio), Aranka LÁSZLÓ (Serbio), Laffi Charles DIATTA (Senegalio), Mireille GROSJEAN (Svislando),

**Komitatanoj de la estraro**: Ahmad MAMDUHI, Karine ARAKELJAN, Laura BRAZZABENI, Alessandra MADELLA, Elena NADIKOVA, Radojica PETROVIĆ, Fernando PITA.

## Tagordo

1. Kontrolo de la kvorumo, inkluzive de la delegoj.

2. Elekto de voĉnombrantoj.

3. Elekto de protokolantoj.

4. Akcepto de la protokolo de la Komitatkunsido dum VEKI-2 (08, 10, kaj 14 Aŭgusto 2021).

5. Kontrolo de la komitataj decidoj de VEKI-2.

6. Rajtigo de la nova financa kontrolisto.

7. Kongreso-2023.

8. Elekto de la nova membro-administranto de ILEI (propono de la Estraro: inĝeniero Hamzeh SHAFIEE).

9. Aprobo de la Estrara Jarraporto.

10. Aprobo de la Laborplano por 2023-2024.

11. Aprobo de la Financa raporto 2021, Buĝeto 2022 kaj Buĝet-propono por 2023.

12. Aprobo de la Raportoj de la Kontrola komisiono por 2020 kaj 2021.

13. Elekto de la Elekta komisiono por 2022-2025.

14. Propono de honora membriĝo por Mireille GROSJEAN.

15. Proponata komisiono aŭ laborgrupo por la renovigado de la retejo de ILEI (Alessandra MADELLA, Cristina BOLLINI, Maximiliano GARCIA).

16. Propono nuligi la C-kategorion por ILEI-membriĝo (por ke homoj en ne-pagipovaj landoj ne devu mem pagi 2 eŭrojn).

**Iro de la kunsido**

## Punkto 1. Kontrolo de la kvorumo, inkluzive de la delegoj.

La komitatkunsidon malfermis la vicprezidanto Alessandra MADELLA per salutado, bonvenigo kaj kontrolo de la ĉeestantoj. La kvorumo estas.

## Punkto 2. Elekto de voĉnombrantoj.

Estos Marc CUFFEZ kaj Gilbert NDIHOKUBWAYO.

## Punkto 3. Elekto de protokolantoj.

Estos Alessandra MADELLA kaj Elena NADIKOVA. La provleganto, laŭ propono de Mirejo havi provleganton ne de la estraro: Mariana EVLOGIEVA.

**Punkto 4. Akcepto de la protokolo de la Komitatkunsido dum VEKI-2 (08, 10, kaj 14 Aŭgusto 2021).**

Plu gvidis la kunsidon la Prezidanto Ahmad Reza MAMDUHI. La protokolo de la Komitatkunsido dum VEKI-2 estis akceptita de ĉiuj komitatanoj, krom unu sindeteno de Marija BELOŠEVIČ, kun la farenda korektaĵo: sinjorino ISHIKAWA Tieko devas esti aldonita al la listo de partoprenintoj.

**Punkto 5. Kontrolo de la komitataj decidoj de VEKI-2.**

Estis unuanime akceptita.

**Punkto 6. Rajtigo de la nova financa kontrolisto.**

Raportis Karine ARAKELJAN, la kasisto de ILEI. Financaj kontrolistoj devis kontroli la financajn rezultojn de ILEI ĝis la 2021a jaro. Tamen estis nur unu kontrolisto el Nederlando – Simon SMITS. Rob MOERBEEK karakterizis lin kiel tre fidindan personon. La duan estis malfacile trovi kaj la tutan laboron faris volontule sinjorino Nvard MANVELJAN el Armenio. Tamen oni forgesis akcepti ŝin kiel kontroliston dum la dua komitatkunsido de VEKI-2. Necesas fari tion nun.

Mirejo rimarkigis, ke la kandidato devas esti ekster la Komitato kaj la Estraro. Sinjorino Nvard MANVELJAN konformas al tiu postulo kaj estis unuanime aprobita kiel nova financa kontrolisto.

**Punktoj 7. Kongreso – 2023.**

Raportis komence Laura BRAZZABENI, poste la Prezidanto de LKK Brunetto CASINI (Bruĉjo KASINI).

La kongreso okazos fizike en Italio samtempe kaj samloke kun la IJK – la kongreso de TEJO, kun parte komuna programo. Por ILEI tio estas granda ŝanco allogi junulojn. Tamen necesas kongruigi kongresajn regularojn de la du asocioj, kiuj malsamas en gravaj punktoj: pri kotizoj, pri aliĝperiodoj kaj pri landkategorioj.

Endis al ŝanĝoj jenaj kondiĉoj:

1) TEJO havas kutime tre altan kotizon por pliaĝuloj. ILEI – male – tro malaltan kotizon por junuloj;

2) TEJO havas 3 kategoriojn, ILEI – 2;

3) TEJO ne intencas havi samtempe virtualan kongreson (hibridan), male de ILEI.

Necesis krei provizore 4 landgrupojn, iel respektante ankaŭ la dividon de aĝoj de TEJO. La komencaj kaj finaj prezoj estas tiuj, kiujn ni jam decidis. TEJO akceptis la koncepton de ILEI pri unu- aŭ du-taga partopreno (pro la simpozio, kiun TEJO ne havas). Ĉiuj rajtos partopreni en la programeroj de ambaŭ organizoj.

Bruĉjo KASINI prezentis rezultan ekvilibritan tabelon kun taŭga solvo por ambaŭ asocioj. Ĝi estas je dispono de ĉiuj komitatanoj.

Radojica PETROVIĆ subtenis la proponon, substrekinte, ke la Estraro sekvis la tutan laboron de LKK. Tiuj ŝanĝoj ne kontraŭas al la interesoj de ILEI kaj kongruas kun la interesoj de TEJO, kaj tial estu aprobitaj nur por ĉi jaro, sekvante la nunajn cirkonstancojn kiel ilia praktika solvo. Krome, la divido de landgrupoj rilate al ilia riĉeco ne ĉiam egalas al pagipovo de iliaj konkretaj civitanoj. Tio estas neperfekteco de la kotiza sistemo por kongresoj ĝenerale. Do, ni rekonfirmu la ĝeneralan validecon de la kongresa regularo kaj akceptu esceptojn nur por ĉi jaro.

Mirejo subtenis la proponon, ĉar ĝi estas tute racia kaj tiuokaze la regularo ne bremsus la organizadon de la kongreso. Krome, ŝanĝoj temas nur pri kotiz-reguloj.

Marija BELOŠEVIČ rememorigis, ke ŝi sendis detalajn komentojn kontraŭ deflankiĝo flanken de la regularo aŭguste kaj petis mencii tion en la protokolo. Farite.

Mirejo diris, ke la Estraro devas aprobi la konsiston de LKK. Se la pago iros al LKK, ILEI devas havi post la kongreso klaran financan raporton. Devas esti preciza valida kontrakto, aprobita de la Estraro.

Laura klarigis, ke kotizojn povas ricevi kaj LKK, kaj la kasisto de ILEI. Ili ambaŭ estas en konstantaj kontaktoj pri tio. Plu, estas malfacile trovi aŭ krei novan Paypal-konton de ILEI, tial la Estraro aprobis akcepti por la organizado de la kongreso la sistemon de la firmao de Bruĉjo KASINI “Edistudio”.

Mirejo demandis, ĉu tiu estrara decido devas esti aprobita de la Komitato?

Ahmad klarigis, ke tiu decido okazas nur por ĉi jaro por komuna kongreso.

Poste sekvis diskuto pri kotizoj por familianoj.

Mirejo proponis sekvi la regularon de ILEI pri familianoj, ĉar junuloj kutime ne havas familiojn. Gilbert NDIHOKUBWAYO demandis pri rabatoj por familioj. Bruĉjo KASINI analizos la regulojn kaj tradiciojn kaj aldonos modifojn.

Alia demando de Radojica PETROVIĆ temis pri rabatoj por akompanantoj de handikapuloj. Bruĉo respondis, ke deviga akompananto estas jam senpaga. Mirejo trovis en IPR 2016/4 paĝo 40: familiano de alia aliĝinto aŭ akompananto de handikapulo pagas 50% de la kotizo, kiun li aŭ ŝi pagus aliĝante sola.

**Fine okazis voĉdonado: Marija BELOŠEVIČ kontraŭ, aliaj akceptis.**

## Punkto 8. Elekto de la nova membro-administranto de ILEI (propono de la estraro: inĝeniero Hamzeh SHAFIEE el Irano).

Alessandra klarigis. Ekde 2013 por tio laboris Sebastian CYPRYCH, kiu faris ĉion inkluzive la 2022-an jaron. Plu li rezignis. Ni ĉiuj dankas lin kaj devas trovi novan respondeculon. Do, estas 3 eblaj solvoj:

1) aprobi sinjoron Hamzeh SHAFIEE, kiu unusola pretas fari tiun laboron senpage;

2) trovi pagitan profesiulon aŭ volontulon;

3) uzi administran servon de UEA, kio kaŭzos pagon. Krome, TEJO tion faris kaj ŝajne ricevis grandan ŝuldon.

Rilate al Hamzeh SHAFIEE ankaŭ ekzistas problemoj:

1) li ne ĉiam povas havi retkonekton en la nuna situacio de sia lando;

2) la sidejo de ILEI estas en Nederlando, t.e. en Eŭropo, kaj Hamzeh loĝas ekstere, do, temos pri protektado de personaj datumoj.

La ebla solvo: unue, dum la reorganizado de la retejo de ILEI ni kreos pasvortprotektatan areon por la datumbazo de membroj de ILEI, kiu tiel sidos fizike en la slovaka servilo de E@I, ene de Eŭropa Unio. Due, Ahmad konas persone Hamzeh SHAFIEE de jaroj kiel fidindan, laboreman kaj paciencan personon. Li estis ĉefmotoro de iranaj kongresoj, mem akceptis iliajn financajn riskojn kaj pagis grandajn sumojn por tiuj kongresoj, estas ĉefredaktoro de la irana tri-monata Esp-revuo Irana Esperantisto.

Mirejo subtenis la kandidatiĝon de Hamzeh.

Alia problemo estas, ke ILEI ne havas klaran bazon de individuaj membroj. Ne estis plena distingo inter individuaj kaj sekciaj membroj. Malfacilas kontroli tion. Tio kaŭzis problemojn: sekcioj komencis malaperi, ĉar homoj aliĝas al la Ligo kiel individuaj membroj. Tial ni komencis pli multe baziĝi sur sekcioj, esperante, ke tio kontraŭstaros la tendencon aliĝi individue, preter sekcioj. Alia afero estas, ke iu loĝas en unu lando, sed apartenas al la alilanda sekcio. Tio estas tute normala, gravas nur, ke ĉiuj sekciestroj sciu pri tio.

Zsófia KÓRÓDY rakontis pri la situacio en la germana sekcio. Ĝi havas pli altan kotizon ol en ILEI, por ke restu mono por interna agado. Tial multaj homoj deziras aliĝi rekte al la Ligo kaj ne restas en la germana sekcio. Ankaŭ multaj aliĝis al ILEI kaj nur poste eksciis, ke ili ne apartenas al sialanda sekcio. Devus esti informo de la kasisto de ILEI en tiuj kazoj, sed tio ne funkciis.

Didier JANOT rimarkigis, ke la sama problemo ekzistas por la dumvivaj membroj. Necesas, ke la informo same venu al sekcioj.

Alessandra MADELLA diris, ke malfacilas por la kasisto kontroli tiun informon, ĉar ĝi venas ofte tre malfrue de UEA.

Radojica PETROVIĆ proponis distingi demandojn pri membroadministranto kaj membroadministrado kaj nun voĉdoni por la nova kandidateco de Hamzeh. Poste kun li en lia nova statuso ni povos pripensi la manieron administri la aferon.

Venis demando de Gilbert NDIHOKUBWAYO, ĉu estas alia kandidato por la posteno de administranto; estas unu.

Ahmad dankis Renato CORSETTI kaj Maria JERKOVIĈ pro ilia sindona laboro rilate al sekcioj.

Sekvis voĉdonado pri nova membroadministranto; **Hamzeh SHAFIEE estis unuanime akceptita.**

## Punkto 9. Aprobo de la Estrara Jarraporto.

Mireille GROSJEAN proponis meti en la raporton Marija BELOŠEVIČ kiel la ĉeforganizanton de la Tago de Lernado. Tio estas grandega laboro, tial devas aperi en Jarraporto. Konsentite. Ahmad dankante ŝin informis, ke Marija organizos la Tagon de Lernado ankaŭ dum la UK en Torino en 2023. Aliaj komentoj ne estis. **La Jarraporto estis aprobita.**

## Punkto 10. Aprobo de la Laborplano 2023-2024.

**Alessandra Madella komentis la planon.**

Ahmad Reza MAMDUHI substrekis, ke la plano estas ampleksa kaj la Estraro strebos plenumi almenaŭ parton.

Laura BRAZZABENI proponis organizi trejnseminarion dum la ILEI-kongreso kadre de la projekto Erasmus de IIE (Itala Instituto de Esperanto). Tio jam estas notita en la Laborplano kun du respondeculoj: ŝi mem kaj Radojica Petrović.

Radojica PETROVIĆ proponis numeri la punktojn por faciligi kontrolon. Konsentite. Li ankaŭ proponis kompili ĉiujn eseojn el la projekto Premio La Torre libroforme kaj petis helpon de Renato CORSETTI kaj Alessandra MADELLA. Alessandra rezignis, ĉar ŝi havas tro da taskoj jam. Tamen ŝi helpos laŭeble, same kiel Renato sendube.

Didier JANOT skribis, ke sekcioj povas senpage krei retpaĝon ĉe https://eventaservo.org.

Gilbert NDIHOKUBWAYO proponis enmeti en la planon subtenon de afrikaj kluboj kaj kursoj. Ofte en Afriko instruistoj malaperas, ĉar mankas subteno. Kvankam estis senditaj multaj lernolibroj tien, ni ne scias, kiel ili estas uzataj.

Alessandra responde rakontis pri la kampanjo de Renato CORSETTI pri monkolektado por sendi librojn al Afriko. Inkluzive por orfoj kaj kamparaj instruejoj sen elektro. Krome, ekzistas fondusoj por Afriko. Por uzi monon necesas antaŭe sendi al la Estraro je la komenco de la jaro projekton kun plano, buĝeto ktp, por ke la Estraro havu klaran informon kaj pridiskutu. Aliokaze ne eblas uzi monon, estas striktaj reguloj. Do, afrikanoj devas mem klopodi komence, probable kun helpo de spertaj esperantistoj kiel Mirejo.

## Punkto 11. Aprobo de la Financa Raporto 2021, Buĝeto 2022 kaj Buĝet-propono por 2023.

Raportis Karine ARAKELJAN.

La ĉefa problemo estas deficito de la papera eldonado de IPR kaj JA, kiel prave substrekis Didier JANOT.

En 2021 ILEI havis eksterordinaran profiton, ĉar venis pago el la francia sekcio por 3 jaroj da kotizoj (2 297€) kaj pli ol 10 jaroj da abonoj al JA (4 388,6€), ĉar pro misfunkciado de proceduro pagoj ne okazis dum multe da jaroj. Nun tio estas solvita kaj ĉiujare ekde 2022 venas pago nur por unu jaro.

La postaj buĝetoj estos pli-malpli ekvilibraj dank' al subvencio (3 000€) de UEA por edukado kiu kovras la deficiton de papera eldono, sed ne plu restas mono por edukaj projektoj

Okazis voĉdonado pri la buĝeto. **Unuanime aprobita.**

### Punkto 12. Aprobo de la Raportoj de la Kontrola Komisiono por 2020 kaj 2021.

Karine klarigis, ke la Raporto 2021 venis lastmomente kun unu subskribo de Simon SMITS. Nun estas aprobita nova financa kontrolistino, sekve, la situacio estas solvita. La raportoj estis unuanime aprobitaj.

### Punkto 13. Elekto de la Voĉdona komisiono por la venonta Estrara elekto.

Mirejo korektis la antaŭan nomon de la punkto al: Elekto de la Elekta komisiono por 2022-2025. Akceptite. Alessandra rememorigis la komisionanojn: Aurora BUTE, Zsófia KÓRÓDY kaj Aristophio Andrade Alves FILHO el Brazilo. Ĉiuj denove kandidatiĝis. Gilbert NDIHOKUBWAYO demandis pri la taskoj de la Elekta komisiono, Alessandra klarigis. La Elekta komisiono estas aprobita unuanime. Ahmad Reza MAMDUHI dankis ĉiujn anojn pro ilia laboro.

### Punkto 14. Propono de honora membriĝo por Mireille GROSJEAN.

Ahmad Reza MAMDUHI informis, ke multaj sekcioj kandidatigis Mireille GROSJEAN por honora membriĝo responde al la iniciato de la kroata sekcio de ILEI “KEU”. Li dankis ŝin pro la grandega laboro por ILEI, kiun ŝi faris kaj faras ĝis nun rilate al JA, IPR kaj la afrika movado. La propono estis unuanime aprobita. Sekvis multaj gratuloj kaj aplaŭdoj al Mirejo, dankaj vortoj de la iniciatinto Marija BELOŠEVIĆ.

### Punkto 15. Proponata komisiono aŭ laborgrupo por la renovigado de la retejo de ILEI (Alessandra MADELLA, Cristina BOLLINI, Maximiliano GARCIA).

Alessandra raportis. La celoj de renovigado estas krei pli allogan aspekton, konservante ĉiujn ekzistantajn materialojn, krom jam malnovigitaj kaj ne plu uzeblaj (ekzemple, la malnova

formularo de ILEI). Ni sukcesis trovi senpagan helpon de la profesia programistino Cristina BOLLINI, membro de la itala sekcio. Ŝi multe laboris por kompreni kaj klarigi por ni la sistemon kaj funkciadon de la retejo. Fakte nia retejo sidas ĉe E@I. Necesas esplori la amason da materialoj kaj savi la plejmulton. Tio estos longa laboro ankaŭ kun Jozefo. Se plene ŝanĝi la retejon, tio kostus 2000-3000 eŭrojn kaj poste ni ne plu kontrolus ĝin. Tial estas neoficiala grupo, sen monelspezoj. Nun la demando estas pri la pli taŭga nomo por la grupo: ĉu laborgrupo aŭ komisiono? Mirejo sugestis "laborgrupo". **Akceptitaj estis kaj la nomo, kaj la laborgrupo mem.** Ĉiuj laboros volontule. La sola monpeto venos de Jozefo por aĉeti skanitajn kopiojn de malnovaj IPR, por realigi ties arkivon en la retejo, se la Estraro tion aprobos. Konsentite.

## Punkto 16. Propono nuligi la C-kategorion por ILEI-membriĝo (por ke homoj en ne-pagipovaj landoj ne devu mem pagi 2 eŭrojn).

Radojica PETROVIĆ klarigis la proponon: nia sistemo de landkategorioj havas kelkajn nekonformecojn. Ekzemple, kiel kolekti kaj ĝiri 2 eŭrojn por C-landanoj, se ili estas nepagipovaj? Aŭ riĉaj kaj malriĉaj homoj povas loĝi kiel en A-landoj tiel en B-landoj. Kiel helpi tiuokaze pere de la Koleghelpa Kaso? C-kategorio nun komplikas la administradon. Tial aperis la propono. **Ĝi estis unuanime akceptita.**

## Punkto 17. Diversaĵoj.

Ĉiuj planitaj demandoj estas traktitaj. Aperis tempo por libera informado.

Laffi Charles DIATTA dankis ĉiujn pro la eblo partopreni en la kunsido kaj informis pri la ILEI-agado en Senegalo. Interalie, nun tie instruas Esperanton du internaciaj instruistoj : Vjaĉeslav IVANOV el Rusio kaj Espoir KASATI el DR Kongo. Mirejo klarigis la situacion. Monon por tiu projekto donis unu svisa mecenato. Temas pri la prepar-kurso antaŭ la Afrika kongreso, kiu okazos ekde 23-26-a de decembro 2022. Venis 20 petskriboj. La ĵurio konsistis el membroj de UEA kaj ILEI. Ĉiuj kandidatoj prezentis sin. Mirejo luktis la tutan novembron pri vizaj demandoj. Nun estos nova svisa subteno – por partopreno en la Afrika Kongreso por ambaŭ instruistoj kaj por la plej bona kaj/aŭ plej meritplena studento. Mirejo ne flugos pro sanaj kialoj, tamen sekvas la aferon kaj virtuale prezentos 4 prelegojn dum la kongreso, dank' al la Zoom-konto de Marija BELOŠEVIČ.

Finiĝis la kunsido per dankoj de la Prezidanto Ahmad Reza MAMDUHI al ĉiuj samideanaj komitatanoj pro bona laboro.

Sekretario de ILEI: Elena NADIKOVA

Vic-prezidantino de ILEI: Alessandra MADELLA

Provlegis: Mariana EVLOGIEVA

2023.02.22.